

LINGVOJ EN INTERNACIA KOMUNIKADO

Humphrey Tonkin (University of Hartford)

Rimarkoj al la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj

Prago, 20-23 julio 1996

La lingvoj de la mondo ne estas nur unuopaj fenomenoj, sed formas sistemon. Ĉiu popolo, ĉiu socio, havas sian lingvan konduton. Tiu kolekto de kondukataj strategioj, kiun difinita socio evoluigas, nomiĝas "lingvo". Ene de tiu "lingvo" kutime ekzistas multaj alternativaj kondukataj strategioj, tiel ke unuopa homo povas elekti el inter ili, sed ene de certaj limoj.

La limoj inter lingvoj ne estas tute klaraj. La nederlanda fariĝis aparta lingvo, dum la svisgermana estas konsiderata kiel dialekto de la germana. La luksemburga iam estis konsiderata germandevena dialekto, sed nun estas rekonata kiel esence aparta lingvo. Se antaŭ cent jaroj oni elmapus la lingvan teron de Prago al Strasburgo kaj de Hamburgo ĝis Norda Italio, oni trovis lingvokondutan geografion en kiu unu dialekto preskaŭ sen specifa limo sorbiĝas en la apudan. En pluraj regionoj de la hodiaŭa Afriko, estas malfacile difini kie unu lingvo -- do unu aro da lingvokondukataj strategioj -- finiĝas kaj la posta komenciĝas. Fakuloj faras siajn dividojn foje iom arbitre. Firmaj limoj inter lingvoj ekestas tiam kiam oni rekonas difinitan lingvon kiel apartan lingvon, elskribas ĝin, normigas ĝin, kaj kreas per tio ian magnetan centron.

Eble oni ne troigus dirante, ke ju pli proksimen oni venas al dialekto, des pli klare ĝi ŝajnas esti lingvo; kaj ju pli foren oni iras, des pli evidente lingvo aspektas kiel dialekto. El Japanio, oni facile povus konsideri la latinidajn lingvojn nuraj dialektoj de la latina, aŭ la ĝermanajn dialektoj de la pragermana.

Granda parto de la homa enloĝantaro uzas ne unu sed eĉ plurajn lingvojn, depende de la cirkonstancoj. Ofte en Afriko, ekzemple, homoj parolas unumaniere en la hejmo, duamaniere en la lernejo, triamaniere en la laboro, kaj kvaramaniere en la rilatoj kun la lokaj instancoj. Foje temas pri kvar tute apartaj lingvoj.

La nocio de "lingvo" en ties kutime akceptita formo, estas tamen esence eŭropa koncepto. La eŭropa nocio, kiu klare distingas unu lingvon disde alia, estas ligita al la eŭropa difino de ŝtato, juro, kulturo, landlimoj. Estas vere, ke en ĉiuj homaj socioj lingvo kaj persona identeco estas firme ligitaj unu kun alia, kaj ke tiu aro de lingvaj kondutoj, al kiu mi aludis, estas konservejo de la historio kaj memkonscio de iu socio. En tiu senco, lingvo estas pli ol simpla sistemo de interŝanĝo de unuopaj mesaĝoj.

Tamen oni ankaŭ povas rigardi lingvojn kiel ilojn, uzeblajn nur dum ili utilas, kaj sekve lerneblajn nur ĝis la nivelo, laŭ kiu oni bezonas ilin. Kiam afrikano lernas difinitan lingvon por trakti kun la vendistoj en la urba vendoplaco, tiu afrikano ne pensas abstraktajn pensojn pri la spirita rolo de lingvoj en la kulturo, sed pri kiel aĉeti oleon aŭ kaserolon.

Niaj lingvoinstruistoj kaj niaj profesoroj foje forgesas, ke lingvo ja estas ilo, kaj ke eblas akiri scion de difinita lingvo pro strikte instrumentaj celoj, kaj por rekta, simpla, senornama komunikado. Tro ofte, la lingvoinstruistoj, ne plu objektivaj en sia sentimentala admiro de la atingoj de sia adoptita kulturo, mistaksas la motivojn de siaj lernantoj, aŭ pli precize, vane deziras, ke ili estu aliaj ol ili estas. Verdire, la tuta nocio de formala lingvolernado estas produkto de skriba kulturo kaj de formalaj edukaj sistemoj. Plejparte eĉ duaj lingvoj (por ne paroli pri la gepatraj) ne estas lernataj ĉefe en klasĉambroj de profesiaj lingvoinstruistoj, sed sur la strato aŭ en la laborejo aŭ ĉe la televida aparato.

Estas evidente, ke ekzistas klara distingo inter lingva konduto kaj lingva politiko. Lingva politiko estas klopodo influi la lingvan konduton per konscia interveno, kutime per ŝanĝo de la sistemo de kompensoj kaj punoj, kiu ĉirkaŭas ĝin. Ne estas facile ŝanĝi la neformalan lingvan konduton, precipe ĉar ĝi baziĝas sur kutimo kaj sur praktikaj necesoj.

Tamen, interveno en la formalan uzadon de lingvoj povas havi profundan efikon. Ŝtatoj kreas edukajn sistemojn, kaj tiuj edukaj sistemoj decidigas, kiujn lingvojn difinita socio instruos al siajn infanojn, kaj per kiu lingvo ili arigos, konservos, kaj utiligos siajn sciojn. Tiuj decidoj ofte baziĝas sur historiaj cirkonstancoj kaj politikaj ligoj, se temas pri fremdlingva instruado, kaj sur la relativa politika potenco de difinitaj etnoj aŭ elitoj se temas pri la norma lingvo de instruado. Registaroj pro similaj kialoj foje intervenas por ŝanĝi skribsistemojn -- kiel en Mongolio, aŭ Azerbajĝano, aŭ Moldavio, kiuj ĉiuj klopodis, kun varia sukceso, forigi la kirilan skribsistemon de siaj iamaj regantoj.

En internacia medio, Unuiĝintaj Nacioj antaŭ kvindek jaroj fiksis la bazon de sia lingva politiko sur sistemon, kiu favoris la venkintojn de la Dua Mondmilito. UN mem estis produkto de la vizio de internacia ordo, kiu kuŝis malantaŭ la militostrategio de la tiamaj aliancanoj, kiuj eĉ foje nomis sin (laŭ la formulo de Roosevelt) "la unuiĝintaj nacioj". Oni aldonis lingvojn depost tiam, sed la baza sistemo restas ĝis hodiaŭ.

Se aliaj postrestaĵoj de la Dua Mondmilito forbalaiĝis samtempe kun la malvarma milito, oni devas demandi sin ĉu ne venis la tempo forbalai ankaŭ la lingvan reĝimon de UN. En la nuna Simpozio, Marie-Josée de Saint Robert klarigis, ke la organizaĵo ne ĉiam sekvas la proprajn regulojn, traktante siajn teorie egalajn laborlingvojn malegale. Tio estas bedaŭrinda kaj korektinda, sed ne tre surpriza. Permesu al mi sugesti, ke malegaleco inter la ses oficialaj lingvoj de UN fariĝas nenio kompare kun la malegaleco inter tiuj ses lingvoj kaj ĉiuj aliaj lingvoj de la mondo. Kiu ordonis, ke en UN oni uzu la rusan aŭ la araban, kaj ne la portugalan au la

indonezian? Aro da diplomatoj en 1945, kiam konceptoj de egaleco kaj nediskriminacio estis aliaj ol ili estas hodiaŭ, kiam la distribuo de monda potenco estis malsimila al la hodiaŭa, kaj kiam nocioj de lingvoj kiel kulturaj portantoj influis pensadon ankoraŭ certagrade imperian, por ne diri imperiisman. Kiel diris Robert Phillipson, la difino de lingva egaleco ĉe UN dependas de la lingva ekologio starigita de tiu organizaĵo.

Ambasadoro Ralph Harry, el Aŭstralio, antaŭ multaj jaroj proponis alternativojn al la nuna lingva sistemo en UN. Liaj konceptoj estus aplikeblaj ankaŭ al aliaj interregistaraj organizaĵoj. Ekzistas pluraj variantoj de la Plano Harry. Tiu, kiun mi pleje favoras, kondukus al utiligo de Esperanto kiel la sola lingvo de interpretado kaj tradukado en difinita organiza medio. Oni tradukus kaj interpretus lingvaĵojn en tiun lingvan normon el kiel eble plej granda aro da etnaj lingvoj. La celo estus maksimumigi la lingvajn rajtojn de la membroj per maksimuma rajtigo uzi la propran lingvon skribe kaj parole. Ili mem devus akiri pasivan scion de Esperanto, sed tio povus veni paŝon post paŝo, per iompostioma enkonduko de la nova sistemo, kaj per subtenaj instruprogramoj. Se temus pri aktiva scio de Esperanto, oni komencus ne ĉe la delegitoj (aŭ en la kazo de la Eŭropa Unio, la parlamentanoj), sed ĉe la oficistoj: Esperanto fariĝus la norma lingvo, la registra lingvo, de la organizaĵo, sed ankaŭ stadion post stadio. Tiu ĉi ne estas la loko por detaligi la planon, sed ĝi estas bazita sur praktika aliro al praktikaj bezonoj. La nuna sistemo estas esence ligita al politikaj kaj identecaj demandoj, ne al la praktikaj bezonojn de efika komunikado.

La aliro de la unuopaj homoj al la internacia vivo estas ĉiam limigita kaj direktita laŭ la lingvoj uzataj kaj uzeblaj de tiuj homoj. Sciencistoj, kiuj scipovas la anglan lingvon, havas signifan avantaĝon; tiuj, kiuj ne scipovas ĝin, estas handikapitaj. Tamen, denaskaj anglalingvanoj, kiuj ne regas aliajn lingvojn, ankaŭ spertas malavantaĝojn: konsiderinda proporcio de la scienca literaturo aperadas en aliaj lingvoj ol la angla.

Tamen, ju pli multe la anglalingvaj sciencistoj difinas la terenon de la agnoskataj scioj laŭ la etendiĝo de la propra lingvo, des pli dependaj fariĝos la ceteraj homoj je tiu anglalingva mondkoncepto. Kiel prave diris Yvo Peeters en la nuna Simpozio, la monoglotoj tenas la potencon: ili povas, se ili sufiĉe insistas kaj havas la rimedojn por insisti, redesejni la mapon de lingva potenco.

Laŭ tiu, anglalingva, mapo, la komunikaj rajtoj estas alireblaj kaj utiligeblaj de ĉiuj, kondiĉe, ke ili lernu la denaskan lingvon de la anglalingvanoj. La rajtoj estas universalaj -- sed nur anglalingvanoj rajtas al la rajtoj....

Evidente, la plej bona ŝanco por ŝanĝi tiun situacion troviĝas ĉe la lingve nepotencaj ŝtatoj kaj socioj, se oni povas konscii ĝin, unue, ke ili estas diskriminacitaj, kaj, due, ke ekzistas vojoj por ŝanĝi tiun situacion. Samtempe, tamen, gravas, ke oni laboru ĝuste inter la anglalingvanoj, por konvinki ilin, ke la etiko de internacia agado postulas multlingvismon, kaj ke ekzistas por ili

avantaĝoj en aŭtentika multlingvismo. Do, se la solvo venos pere de la nepotencaj ŝtatoj, la potencaj devos ĝin permesi.

Unu vojo al tio estas rigardi al sukcesaj aplikoj de aliaj komunikistemoj, kiuj ne dependas nur de ia anglalingvismo aŭ de iu plurlingvismo inter lingvoj de alta prestiĝo. Ankaŭ gravas preni en konsideron la fakton, ke en estonteco la utiligo de elektronikaj komunikiloj kaj edukiloj eventuale profunde ŝanĝos la eblecojn kaj rimedojn por lerni, uzi, kaj traduki lingvojn. Sed tiuj, kiuj deziras ŝanĝi la internacian lingvan ordon tamen frontas du grandegajn defiojn. Unue, kiel ni jam konstatis, malfacilas ŝanĝi la neformalan lingvouzon: dum ekzistas televidiloj kaj la Tutmonda Teksaĵo, la homoj lernas la anglan lingvon spite intervenon de lingvoplanistoj kaj lingvoinstruistoj. Due, malfacile oni povas ŝanĝi la elitajn aliron al lingvoj, laŭ kiu unu lingvo estas kulture pli valora ol alia kaj sekve supozeble pli utila por komunikado ol alia. Mi ne diras, ke ĉiuj lingvoj estas egalaj (tiun terenon mi ne eniras) -- nur, ke oni emas fundamenti la propran senton de supereco sur iun mistikigon de la propra lingvo, kiun oni emas supozi ne nur kulture supera sed ankaŭ sekve pli taŭga por la internacia komunikado. Tiaj klopodoj dikti la kondiĉojn de la internacia komunikado malhelpas la aŭtentikan internaciigon de la komunikaj linioj mem.